**15-a Internacia Medicinista**

**Esperanto-Konferenco**

Plovdiv 11-16.07.2005 j.

# K O N G R E S A  L I B R O

Sub honora protektado de

Ĉefurbestro de la urbo Plovdiv

D-ro Ivan Ĉomakov

ĈEFORGANIZANTO:

UNIVERSALA MEDICINA ESPERANTO-ASOCIO



Estas honoro por Plovdiv esti dommastro de la Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco – Plovdiv, 2005. Nia urbo estas konata kiel forta kleriga kaj scienca centro pri medicino. Ĉi-tie laboras spertaj profesiuloj, sin dediĉintaj entute al la scienco por savado de la homa sano.

Staras antaŭ vi la takso diskuti la komplikan problemon kiel trovi la plej bonajn metodojn por plifortigi kaj protekti la homan imunan sistemon.

La interŝanĝo de sperto kaj atingoj inter sciencistoj de diversaj landoj havos sian grandegan kontribuon por la disvolviĝo de la sanprotektado. Ĉar nur per unuiĝo de niaj klopodoj eblas atingi realajn sukcesojn por la estontaj generacioj.

Mi salutas per "Bonan Venon!" la enlandajn kaj la eksterlandajn gastojn, elkore bondezirante sukceson de la forumo, altajn sciencajn atingojn, personan sanon kaj prosperon al vi ĉiuj.

D-ro Ivan Ĉomakov

Urbestro de Plovdiv

За брошура на IMEK'15 – Международна медицинска есперантска конференция (11-16.07.2005, Пловдив)

**Чест е за Пловдив да бъде домакин на Международната медицинска есперантска конференция – Пловдив 2005. Нашият град е известен като силен образователен и научен център по медицина. Тук работят опитни професионалисти, отдадени всецяло на науката за запазване на човешкото здраве.**

**Предстои Ви да обсъждате сложния проблем за намиране на най-добрите методи за усилване и предпазване на човешката имунна система. Обмяната на опит и постижения между учени от различни държави ще има своя огромен принос за развитието на здравеопазването. Защото само с обединени усилия можем да постигнем реални успехи за бъдещите поколения.**

**Приветствам с Добре дошли гостите от страната и чужбина и от сърце пожелавам успех на форума, високи постижения в научните Ви разработки, лично здраве и просперитет за всеки от Вас.**

**С поздрав,**

**д-р Иван Чомаков**
**Кмет на Пловдив**

Okayama, la 1-an de julio, 2005

Altestimata Urbestro de Plovdiv, D-ro Ivan Ĉomakov

Estas por mi ĝojo prezenti al vi d-ron Hideki Harada, la prezidanton de Okayama Esperanto-Societo, kiu vizitas vian urbon.

Okayama Esperanto-Societo, fondita en la jaro 1953, laboras por studi kaj propagandi Esperanton. Ĝi progresigas esperantistojn enlandajn kaj eksterlandajn, ankaŭ partoprenante Esperantajn aranĝojn enlande kaj eksterlande.

En la venonta jaro oktobre, la 93a Japana Kongreso de Esperantistoj havos sian lokon en Okayama, jubileante la 100-jariĝon de la fondiĝo de ,,Japana Esperanto-Asocio", kio estis la komenco de landskala Esperanto-movado en Japanio.

Ĉifoje Hideki Harada, la prezidanto de Okayama Esperanto-Societo vizitas vian urbon por partopreni en la 15a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco. Ĉiokaze mi deziras ke vi afablas priatenti lin por ke lia restado en via urbo estu signifoplena.

Fine mi esperas vian fruktoriĉan aktivadon kaj la prosperon de via urbo.

Sincere via,

la urbestro de Okayama

(subskribo)

ORGANIZA KOMITATO:

Prezidanto de la LKK

D-rino Eva Boyadjieva

D-ro Imre FERENCZY – Prezidanto de la Universala Medicina Esperanto - Asocio

D-ro Włodzimierz OPOKA – Ĝenerala Sekretario de UMEA

HONORA KOMITATO

Prof. Saburoo YAMAZOE (Japanio) – HONORA PREZIDANTO DE UMEA

Prof. Sakutaro TADOKORO (Japanio) – ESTRARANO DE UMEA

D-ro Imre FERENCZY (Hungario) – Prezidanto de la Universala Medicina Esperanto - Asocio

Prof. d-ro Stevens T. NORVELL (Kanado) – Landa Delegito de UMEA en Kanado

LA 15-A INTERNACIA MEDICINISTA ESPERANTO-KONFERENCO

Plovdiv 11-16.07.2005 (Bulgario)

La ĉeftemo de la 15-a IMEK:

AKTIVIGO DE LA IMUNA SISTEMO LAŬ DIVERSAJ METODOJ

La programo de la Konferenco inkluzivos ĉefe la tradiciajn kaj aliajn diversajn kuracmetodojn. Oni prezentos la novajn kuracilojn, modernajn diagnozaparatojn kaj kuracaparatojn.

La prelegon, kiu rilatos al la ĉeftemo de la 15-a IMEK prezentos prof. ZLATEV, imunologo de la Medicina Universitato en Plovdiv.

**PROGRAMO DE LA 15-a IMEK**

**Lundo, 11.07.'05**

| | |
|---|---|
| 12,00 – 20,00 | Alveno kaj akcepto de la partoprenantoj, la giĉeto funkcias |
| 19,00 – 22,00 | Interkona vespero en hotelo "Leipzig" |

**Mardo, 12.07.'05**

| | |
|---|---|
| 08.00 – 20,00 | Alveno kaj akcepto de la partoprenantoj, la giĉeto funkcias |
| 09,00 – 11,00 | Solena Malfermo de la Konferenco en la Medicina Universitato |
| 11,00 – 11,30 | Malfermo de Esperanto - ekspozicio |
| 12,00 – 13,30 | Vizito de Kliniko en la Medicina Universitato |
| 15,30 – 18,30 | Scienca kunsido |

**Merkredo, 13.07.'05**

| | |
|---|---|
| 09.00 – 17,00 | La giĉeto funkcias |
| 09,00 – 11,00 | Scienca kunsido |
| 12,00 – 13,00 | Akcepto ĉe la Urbestro de Plovdiv |
| 13,00 – 13,30 | Trarigardo de ekspozicio en la Kultura Centro "Trakart" |
| 15,30 – 17,00 | Scienca kunsido |
| 17,00 – 18,30 | Vizito de la antikva parto de la urbo kun Esperanto - ĉiĉeronado |
| 18,30 – 19,30 | Vizito de moskejo, ortodoksa kaj romokatolika preĝejoj |
| 20,00 | Festa vespermanĝo en la hotelo "Leipzig" |

**Ĵaŭdo, 14.07.'05**

| | |
|---|---|
| 07,35 | Foriro de la stacidomo al la kuraca banloko Hisar |
| 09,30 – 11,30 | Scienca kunsido |
| 12,00 – 13,30 | Elektebla programo:<br>- Yumeiho demonstracio<br>- Vizito de la Sanatorio |
| 15,00 – 17,00 | Elektebla programo:<br>- Yumeiho demonstracio<br>- Banado en la minerala akvo |

**Vendredo, 15.07.'05**

| | |
|---|---|
| 09,00 – 16,00 | Tuttaga ekskurso al urbo Koprivŝtica |
| 15,00 – 17,00 | Reveno al Plovdiv |

**Sabato, 16.07.'05**

| | |
|---|---|
| 09,00 – 11,30 | Scienca kunsido |
| *12,00 – 13,00* | *Solena fermo de la Konferenco* |

*PRI LA KONGRESURBO PLOVDIV*

*La Supra Trakia ebenaĵo estas la plej granda kaj plej fruktodona ebenaĵo en Bulgario kaj unu el la plej vastaj sur la Balkana duoninsulo. Ĝia surfaco egalas al 6030 kvadrataj kilometroj kaj la meza alteco estas 168 metroj. La klimato estas relative milda. En ĝi estas bonegaj kondiĉoj por la agrikulturo. Tie kreskas tritiko, maizo, aveno, hordeo, tomatoj, paprikoj, fragoj, pomoj, persikoj, vinberoj, tabako, rizo, ternuksoj k.a. Evoluinta estas la legomproduktado en forcejoj kaj oranĝerioj. La teritorio favoras la transporton kaj la ĝeneralan ekonomian evoluon de la ebenaĵo. De profunda antikveco tie loĝis tracaj gentoj, kiuj donis la nomon al la ebenaĵo. La antikva poeto Homero nomas Tracion "lando de la abunda rikolto, patrino de lanoriĉaj ŝafaroj kaj belegaj ĉevaloj". Pri rivero Marica, kiu en la antikvaj tempoj nomiĝis Hebros, verkis versojn la romia poeto Ovidio.*

*Plovdiv (350000 enloĝantoj) estas la dua plej granda kaj signifa urbo en Bulgario. Ĝi situas sur la bordoj de la rivero Marica kaj sur ses sienitaj montetoj. La urbo troviĝas sur grava internacia krucvojo kiu ligas la Orienton kun la Okcidento. La bela situo donas al la urbo unikan ĉarmon kaj jam en la antikvaj tempoj Herodoto kaj Lukano priskribis ĝin en siaj verkoj kiel "urbo, kiu brilas de malproksime". Sur la dekstra bordo de la rivero Marica situas la ses montetoj.*

*La urbo havas kelkmiljaran historion. Unue tie loĝis homoj en la novŝtona, ŝtonkupra kaj bronza epokoj. Laŭ la legendo la unuan loĝlokon tie fondis la traca heroo Evmolpij, kaj la loko estis nomata Evmolpia (de la IV-a ĝis la I-a jarmilo antaŭ Kristo). En la jaro 342 a.K. Filipo II-a, La Makedona, fortikigis la lokon kaj fondis urbon, kiu ricevis la nomon Filipopolis ("Urbo de Filipo"). En la III-a jarcento a.K. la urbo, jam sub la nomo Pulpudeva, estis konkerita de la keltoj. En la I-a j.c. de nia epoko tiu ĉi antikva urbo falis sub la regadon de Romio kaj ricevis la nomon Trimoncium kaj estiĝis "la plej brila urbo en Tracio". Poste ĝin regis Bizanco. Ĝia slava nomo en la kadroj de la bulgara stato estis Plavdin. En la jaro 1364 post longa rezisto la urbo falis en la manojn de la turkoj, kiuj nomis ĝin Filibe. Dum la bulgara Renesanco la urbo estis vigla ekonomia centro. La 17-an de januaro 1878 la armeo de la rusa generalo Gurko liberigis la urbon kaj ĝi estiĝis la ĉefa urbo de Orienta Rumelio (provinco sub la regado de la sultano). Ekfloris aktiva kultura vivo. La urbo estiĝis centro de revolucia movado, kiu okazigis kuniĝon de Orienta Rumelio kaj Princlando Bulgario, proklamita en Plovdiv la 6-an de septembro 1885.*

*Post la liberigo Plovdiv komencis evolui kiel industria centro. En 1892 okazis la Unua Agrikultura - Industria Ekspozicio. En 1895 estis fondita la Plovdiva Komerca-Industria Ĉambro kiu iniciatis la okazigon de la plovdivaj ekspozicioj. Tri jarojn poste la Pariza Kongreso de La Asocio de Internaciaj Foiroj rajtigis Plovdiv esti organizanto de internacia foiro. En la lastaj 50 jaroj la plovdiva ekonomio trapasis kelkajn evoluetapojn.*

*La plovdivaj entreprenistoj nun provas sukcese respondi al la defioj de la esencaj problemoj de la transiro al merkata ekonomio. La plovdiva industrio ne perdis sian multbranĉan strukturon. Evoluas precipe la firmaoj de la nutroindustrio kaj la pezmetala industrio, kemio kaj maŝinkonstruado, produktado de celulozo kaj papero, elektroniko kaj elektrotekniko, teksa kaj ŝuprodukta industrio. La urbo estas ankaŭ centro de kulturo, kie funkcias drama kaj opera teatroj, filharmonia orkestro, pupteatro, artgalerioj, la Popola Biblioteko "Ivan Vazov" (fondita en 1879), la ŝtata folklora dancensemblo "Trakia", multaj muzeoj: historia (placo "Saedinenie" 1), arkeologia (placo "Saedinenie" 1), etnografia (str. "D-ro Ĉomakov" 2), naturscienca (str. "Hr.G.Danov" 34), muzeo de la aviado (ĉe la Plovdiva flughaveno en la vilaĝo Krumovo) k.a. Plovdiv estas ankaŭ universitata urbo.*

*Al turistoj kaj gastoj la kongresa urbo proponas por vizito multajn interesajn objektojn. En la Malnova urbo, sur la Trimonto (montetoj Nebet Tepe, Ĝambaz Tepe, Taksim Tepe), oni povas vidi restaĵojn de antikva loĝloko, de fortikaĵaj muroj kaj la konserviĝintan orientan fortikaĵan pordegon konatan sub la turka nomo "Hisar kapija". Tie estas pitoreskaj domoj - modeloj de originala renesanca arkitekturo, kun elegantaj frontonoj, belaj korbeloj, mirindaj freskoj, riĉa interna aranĝo. Kelkaj el ili nun estas muzeoj:*

***La domo de Kujumĝioglu** (1847), kiu brile reprezentas la plovdivan renesancan arkitekturon, estas etnografia muzeo, en kiu estas eksponita la materia kulturo en la regiono de Plovdiv en la tempo de la renesanco. En ĝia korto ĉiujare okazas internacia festivalo de la ĉambromuziko.*

***La Domo de Georgiadi** (1846) troviĝas apud Hisar kapija. Ĝi kompletigas unu el la plej interesaj arkitekturaj ensembloj de la malnova urbo kaj estas konsiderata la plej supera modelo de simetria domo. La fasado estas pitoreske ornamita per la populara arkitektura formo "vekto".*

***La domo de Georgi Mavridi** (1829-1830) estas frua modelo de la plovdiva simetria domo. En ĝi restadis en 1835 revene de sia vojaĝo tra la Otiento la franca poeto Lamartine kaj nun en la domo estas muzea*

*angulo pri li.*

*La malnovtempa **preĝejo "Sanktaj Konstanteno kaj Heleno"** estas konstruita en 1832 sur malnovaj preĝejaj fundamentoj. La 5-etaĝa sonorilturo estas 13 m. alta. En la preĝejo estas orumita ikonostazo - modelo de la plej frua bulgara baroko.*

*En str. "Saboma" 18 troviĝas domo konstruita en 1858-60 de d-ro Stojan Ĉomakov, en kiu estas ekpoziciita la plej granda kolekto de pentraĵoj faritaj de la rimarkinda plovdiva pentristo Zlatju Bojaĝiev en liaj du periodoj de kreado.*

***La domo de Hindlijan** (str. "Artin Gidikov" 4) estas konstruita en 1835 kaj estas monumento de la kulturo de naciskala signifo. Ĝi estas unika pro sia arta dekoracio, pro multaj originalaj freskoj.*

***La Antikva teatro** situas en la suda parto de la Trimonteto (sur Ĝambaz Tepe). Ĝi estas konstruita en la tempo de la regado de la romia imperiestro Trajan en 114-117 kaj detruita en la V-a jarcento. Tie okazadis spektakloj kaj solenaĵoj en la daŭro de kvar jarcentoj. En la lastaj jardekoj ĝi estis rekonstruita kaj nun en ĝi somere okazas diversaj koncertoj kaj spektakloj.*

*Grandan arkitekturan valoron havas ankaŭ la **preĝejoj "Sankta Marina"** (1852-1853 ), kies ikonostazo estas ornamita per fajna lignogravuraĵo kaj la katedrala **preĝejo "Sankta Dipatrino"** konstruita en 1844. Krom ortodoksaj estas ankaŭ aliaj. En la katolika preĝejo „Sankta Ludoviko" la Papo Johano Paŭlo la II-a renkontiĝis ĉi tie kun junuloj dum sia vizito en Bulgario.*

*En Plovdiv estas multaj monumentoj de la tempo de la turka regado. Plej rimarkindaj arkitekturaj monumentoj inter ili estas la **moskeoj Ĝumaja kaj Imaret**. En la centro de Plovdiv oni povas vidi malgrandan parton de **stadiono de la tempo de la romia regado.** Tie okazis diversaj sportaj ludoj kiujn povis spekti 30000 personoj. La malkovrita sektoro montras parton de la amfiteatraj sidlokoj konservitaj en 13 vicoj. La sidejoj ornamitaj per leonaj piedetoj estas el marmoro. Sur unu el la plovdivaj montetoj, **Saĥat Tepe (Horloĝa monteto),** jam en la tempo de la turka regado estis konstruita alta plurangula turo, sur kiu estis instalita horloĝo, kies sonoro estis aŭdebla en la plej malproksimaj urbopartoj.*

***La monteto Bunarĝik** estas alta 234 metrojn. Sur ĝia supro staras du monumentoj: omaĝe al la rusa caro-liberiginto kaj al la sovetaj soldatoj-liberigintoj.*

*Antaŭnelonge estis malfermitaj en la centro romia „Forumo" kaj proksime*

*de ĝi konstanta ekzpozicio „Trakart", en kiu estas mozaikoj de la romiaj temoj. Plovdiv estas centro de la kultura kaj itelekta vivo, urbo de la pentristoj, kantistoj, aktoroj kaj intelektuloj. Ĝi konstante moderniĝas kaj estos tre grava balkan transporta krucvojo post la konstruado de dua Danuba Kalafat-Vidin ponto kaj post la rekonstruo de la Plovdiva flughaveno.*

*Ewa BOYADJIEVA*

# RESUMOJ

## Inkontinenco de pigmento

dr Ilona Bikszádi, dr Erzsébet Szakos, dr Gyula Foerster

Borsod Departementa Hospitalo kaj Universitata Instruanta Hospitalo, Infansanitara Centro

Inkontinenco de pigmento estas rara heredara malsano, kio povas havi diversajn komplikaĵojn. Ĉe nia novnaskita pacientino fliktena haŭtfenomeno komenciĝis post kelkaj tagoj de sia naskiĝo. La unua diagnozo estis stafilodermo kaj ĝi ricevis antibiotikon, sed la malsano ne boniĝis. Pro tio la dua diagnozo estis strofulo de novnaskitoj kaj ni atendis la spontanean resaniĝadon. La familia anamnezo estis nekonata tiam ankoraŭ. Pli malfrue ni eksciis, ke ankaŭ la patrino havis similan haŭtfenomenon, kiam ŝi estis bebulino. Tiam la tria diagnozo iĝis inkontinenco de pigmento, kion ankaŭ la histologia ekzameno konfirmis.

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Ferenczy Imre | M | iferdr@matavnet.hu | 01-01-01 | Hungario | 9026 Gyoer, Kaloczy ter 15 | Prezidanto de UMEA | | UK | |
| Azarhousgang Gholamreza | M | | 01-02-08 | Irano | 589 negarestan 8th, Blvd Nour, Hakimieh tehranpars | Yumeiho-specialisto, bezonas iun invitleteron, KEL faros tion pro la UK. | | UK | |
| Hegyi Istvan, d-ro | M | | 01-02-08 | Hungario | Batthya'ny u. 19 D. II. 9, H-8200 Veszpre'm | | 1. Rehabilitada programo cxe mense difektitaj geknaboj | | infankura |
| Sugitani Hiroko | Z | hiro-s7@sirius.ocn.ne.jp | 01-02-08 | Japanio | adreso... | helpanto volontulo | Petas helplaboron. Agxo 66 | UK | |
| Nitzsche Frank | M | dr.f.nitzsche@abo.freiepresse.de | 01-02-10 | Germanio | Am Karbel 66; 09116 Chemnitz | Handikapulo, pene sidanta. | 1. Lumigado de laborlokoj | | |
| Sxigaev Nikolaj | M | narkes@mail.ru<br>Miscvi@ufacom.ru | 01-02-10 | Rusio | 450077, Ufa, Posadskaja, 18-3 | Bezonas invitilon. Aligxos al UK, tiam ili sendu gxin. | 1. Metodoj de kontrolo dum instruado de klinika farmakologio<br>2. Analizo de farmakoterapio dum kardiokirurgiaj operacioj kun hipotermio<br>3. Kuracado de matabolo sindromo | UK | |
| Petera Josef | M | | 01-02-15 | Cxehxio | E.Kra'snohorske' 2334, 54401 Dvur Kra'love' nad Labem | | | | rentgena laboranto |
| Sorin Iga | M | igasorin@mail.com | 01-02-15 | Rumanio | Bicaz 17 ap.2, Timis'oara-1900 | Rumana Yumeiho prezidanto. | | | |
| Opoka Wlodzimierz | M | mfopoka@cyf-kr.edu.pl | 01-02-20 | Pollando | | UMEA-sekretario; eble tralegos la prelegon de Saburo Yamazoe: 2-11-11 Bunkyo-tyo, Maebasi-si, 371: 1. La influo de muskola laboro sur la metabolon de proteino | | | |
| Edzino de Hideki Harada | Z | | 01-02-22 | Japanio | | | | | |
| Hideki Harada | M | hideki.harada@nifty.ne.jp | 01-02-22 | Japanio | | | Espereble prelegos pri io. | | |

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *Lázár Gábor d-ro* | *M* | | *01-02-26* | *Rumanio* | *Stefan cel Mare 26/A, RO-4055 Covasna* | *kun edzino; FD UEA por medicino, landa delegito de UMEA* | *1. Kuracistaj pioniroj de Esperanto en Rumanio<br>2. Infektaj malsanoj kiuj minacas la homaron* | *UK* | *emerita cxefkurac* |
| *Lázár Rozalia* | *Z* | | *01-02-26* | *Rumanio* | *Stefan cel Mare 26/A, RO-4055 Covasna* | *kun edzo* | | *UK* | |
| *Campos Herondina* | *Z* | *lamasson@netsite.com.br* | *01-03-07* | *Brazilo* | *R.Americo Brasiliense, 1418,<br>cep 14015-050 Ribeirao Preto* | *Cxu logxi kun Soares Izao Carneiro???* | | | *kuracistin* |
| *Clopeau Denis-Serge* | *M* | *docteur.clopeau@wanadoo.fr* | *01-03-07* | *Francio* | *no. 6 J.P.Calloc'h, F-22000 St Brieuc* | | *Eble prelegos; informos min poste* | | *kuracisto* |
| *Saionji Masayuki* | *M* | *saionji@yumeiho.co.jp* | *01-03-14* | *Japanio* | *100-8691 C.P.O. Tokyo Box No. 405* | | *Yumeiho-seminario; Prelego por osijekaj fizioterapeuxtoj<br>IMEK-prelego:<br>1. Klonik malsano kiel okazas (aperas kaj malaperas)* | | |
| *Kopecna Eva* | *Z* | *Eva_Kopecna@galena.cz* | *01-03-19* | *Cxehxio* | *Pekarska' 84, Opava (74505)* | | *INTENCIS PRELEGI, SED NE POVOS VERSXAJNE. 1. Malsanoj de famaj pentristoj (necesa komputila projekciilo)* | | *kuracistin* |
| *Bérces Tolnay Gabriela* | *Z* | | *01-04-13* | *Hungario* | | *kun edzo* | *Deziras prelegi; propra auxto* | | |
| *Ciortea Petro* | *M* | | *01-04-13* | *Hungario* | *Gamab ut. 40, Ho'dmezo"va'sa'rhely* | | | | *anestezio kuracisto* |
| *Faragó Katarina* | *Z* | *esp-med@freemail.hu* | *01-04-13* | *Hungario* | *Pf. 89, H-6800 Ho'dmezo"va'sa'rhely* | *Hungara Yumeiho prezidanto, HEA estrarano* | *Deziras prelegi. 10.1.1946* | *UK* | *Medicina bibliotekis* |
| *Ga'l Ildiko* | *Z* | | *01-04-13* | *Hungario* | *Oldalkosa'r 10-a, Ho'dmezo"va'sa'rhely* | *kun edzo* | *Deziras prelegi; propra auxto* | | *instruistin (elem.lern* |
| *Ga'l Jozsef* | *M* | | *01-04-13* | *Hungario* | *Oldalkosa'r 10-a, Ho'dmezo"va'sa'rhely* | *kun edzino* | *Deziras prelegi; propra auxto* | | *euxropa ingxenier* |
| *Konkoly Karlo* | *M* | | *01-04-13* | *Hungario* | *Szent Istva'n 59, Ho'dmezo"va'sa'rhely* | *Logxi kun Konkoly Zsuzsana<br>Handikapulo,* | | *UK* | *emeritulo* |

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | protezo dekstra gambo. | | | |
| Konkoly Zsuzsana | Z | | 01-04-13 | Hungario | Szent Istva'n 59, Ho'dmezo"va'sa'rhely | Logxi kun Konkoly Karlo | 02.11.1953 | UK | Socia zorg |
| Varga Illés Elizabeta | Z | | 01-04-13 | Hungario | | kun edzo | Deziras prelegi; propra auxto | | |
| Soares Izao Carneiro | M | lamasson@netsite.com.br | 01-04-24 | Brazilo | R.Americo Brasiliense, 1418, cep 14015-050 Ribeirao Preto | Cxu logxi kun Campos Herondina??? | 1. Muzeo de homeopatio nacie kaj internacie laux la filozofio de Zamenhof | | kuracisto |
| Pacola Radek | M | pacola.radek@quick.cz | 01-05-07 | Cxehxio | Bludovice 93, Novy' Jièi'n (74101) | | | | dentkurac |
| Opoka Krzysztof | M | | 01-05-16 | Pollando | ul. Boh. Warszaw 94, 28-100 Busko Zdroj | Frato de Wladimir Opoka; Yumeiho-terapisto | | | |
| Petkoviæ Dragan | M | maseratidragan@yahoo.com | 01-05-21 | Auxstrio | Kugel Gasse 8, A-3100 St Poelten | Neesperantisto aux komencanto; devenas el Jugoslavio | | | fizioterap kaj masag |
| Schumann Bert | M | bsn@agl.fr | 01-05-25 | Francio | 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sevigne | | La temo de mia prelego: ....En vespera programo mi sxatus prezenti miajn 2 KompaktDiskojn de franca kanzono kaj kanti kelkajn kantojn. Por tio mi bezonus KompaktDisko-Legilon kaj se eble mikrofonon. | | |
| Sadza Agnieszka | Z | suneto@poczta.onet.pl | 01-05-28 | Pollando | ul.Lubelska 41/37, 41-219 Sosnowiec | profesio: dentoteknikistino (mi laboras ankaux en Radioterapia fako) studentino de Publika Sano sur la Medika Akademio | 08.07.1977 | | dentotekn |
| Ivanov Vitalij | M | (sakura@kras.ru) | 01-06-01 | Rusio | pr. Metallurgov, 30-148, 660005 u. Krasnojarsk | Vicprezidanto de SYS, masagxisto en rehabilitacia centro "Sakura" | | | |

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *Shchebenikov Vladislav* | *M* | *sakura@kras.ru* | *01-06-01* | *Rusio* | *pr.Krasnojarskij rabocxij, 151-84, 660093 u. Krasnojarsk* | *Prezidanto de SYS (Siberia Ymeiho Societo), direktoro de rehabilitacia centro de Krasnijarska Medicina Akademio* | *"La historio de la evoluo de orienta rehabilitacia terapio "Yumeiho" en Siberio" "Strukturaj problemoj cxe infanoj naskigxperiodaj"* | |
| *Eizenberga Sandra* | *Z* | *(andis@jt.lv)* | *01-06-02* | *Latvio* | | *ili aligxis anglalingve* | *07.8.1965* | |
| *Lazejeva Jelena* | *Z* | *(andis@jt.lv)* | *01-06-02* | *Latvio* | | *ili aligxis anglalingve* | *14.9.1956* | |
| *Salna Jolanta* | *Z* | *andis@jt.lv* | *01-06-02* | *Latvio* | | *ili aligxis anglalingve* | *25.10.1963* | |
| *Bikszádi Ilona* | *Z* | *bikszadi.iiigyek@bazmkorhaz.hu* | *01-06-14* | *Hungario* | *1091 Budapest, Üllői út 101.IV.12* | *Vivas en Budapest (cxefe semajnfine), laboras en Miskolc. Posxtelefono 36-30-8536863* | *11.7.1946.Rara formo de sindromo de Lewandowsky-Lutz kauzanta diagnozan problemon* | *infankura kaj derma* |
| *Gerbec Maria Sione* | *Z* | *maria1948@interfree.it* | *01-06-20* | *Italio* | *Via Crevatini 8, 34015 Muggia (TS ) Italia* | *parki auxto-ruldomon; edzino de Danilo* | | |
| *Gerbec Danilo* | *M* | *maria1948@interfree.it* | *01-06-20* | *Italio* | *Via Crevatini 8, 34015 Muggia (TS ) Italia* | *edzo de Maria Siona* | | |
| *Buzzi Danielle* | *Z* | *danycoquelicot@libero.it* | *01-06-25* | *Italio* | *Via dell'Industria, 30, 34144 TRIESTE* | *tre malone parolanta* | | *akusxistin flegistino* |
| *Michev Orlin* | *M* | *biostimul@dir.bg* | *01-06-26* | *Bulgario* | *Stefan Stambolov 27, Sofia* | | | |
| *Markov Milen* | *M* | *milen_yumeiho@yahoo.com* | *01-06-26* | *Bulgario* | *zh.k. Mladost bl 113 vh.2 ap.35, 9000 Varna* | *prezidanto de BYA* | | |